

KATALUNA ESPERANTISTO

Monata Esperanta Gazeto



JARO VIII^a : JAN.-APRILLO 1917

1

Listo numero

La Movado en Usono ĉiam progresas!

AMERIKA ESPERANTISTO

Oficiala Organo de la Esperanta Asocio de Norda Ameriko,
montras al vi

KIAL — KIE — KIOM

(\$ 1.00 JARE EN USONO)

Dum la deviga dormado de tiel multaj Esp. gazetoj:

SPECIALA EKSTERLANDA PREZO NUR Sm. 2.000

(Anstataŭ Sm. 2.500)

MENDU NUN — UNUA NUMERO SENPAGE!

The American Esperantist Co., Inc.

West Newton, Mass., Usono

Nia devizo: *Mare etas gularo*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Katalana Esperantista Federacio,

DE Baska Esperanta Federacio KAJ
DE Aragona Esperantista FederacioRedakcio kaj Administracio:
Diputació, 280 : Barcelona

D-ro LAZARO LUDOVIKO ZAMENHOF

morlis en Varsovio la 14^{ta} de Aprilo de 1917^a

Jus ĉe la kompostado de tiu ĉi numero de nia gazeto atingas nin la dolora sciigo pri la morto de nia kara Majstro. Terura estas la malfeliĉo kiu falis sur la esperantistaron kun la morto de ĝia glora kondukanto.

Ĉiu esperantista koro rememoros en tiu ĉi momento kun emocio la grandajn meritojn, la bonecon kaj modestecon kiuj ornamis la elpensinton de Esperanto kaj kiuj vekis profundan, nepereigeblan simpatian en la koro de tiom multe da homoj diverslandaj kaj diverslingvaj. La memoro pri lia granda verko neniam malaperos el la penso de la homoj.

Ni ne povas en tiu ĉi numero dediĉi al lia memoro kaj al lia vivo plene domita al la homaro la spacon kiun ili meritas; ni faros tion en la venonta numero ka ni tiel pagos lamaniere la ŝuldon kiun la esperantistoj havas al li.

Al lia bonkora edzino, al liaj simpatiaj gefiloj kaj fratoj, ankoraŭ dolorigitaj de la morto de lia frato Aleksandro, KATALUNA ESPERANTISTO sendas en la nomo de la Komitato de K. E. F. kaj de ĉiuj federaciuloj la esprimon de sia kora kondolenco.

Pri la Internacia Eksperimento

EN la unuaj tagoj de Oktobro 1916^a sendis S-ro S. R. Marshall el Londono al ĉiuj esperantaj gazetoj kaj al multaj diversaj esperantistaj grupoj en la tuta mondo tre interesan cirkuleron klarigante per ĝi la celon de sia elpenaĵo kaj invitante al ĉiuj esperantistoj partopreni kaj helpi lian propagandan laboron; ni eltiras el tiu tre leginda cirkulero la paragrafojn kiuj resumas kaj enhavas en si la tutan pensmanieron de ĝia aŭtoro :

«Eksplorante la statistikon pri nia movado oni trovas, ke la kreskado dum la lastaj jaroj estas sufiĉe preparolinda, kiam oni memoras, ke la propagando estas farita precipe laŭ la paca kaj frateca vidpunktoj, sed kioma estus la amplekso de nia afero, se ni estus povintaj fari tiom da laboro laŭ la praktika kaj komerca vidpunktoj?

Ni ja scias, ke tio postulas aŭ grandan kapitalon aŭ specialajn cirkonstancojn, kaj ĝis nun la sorto ne donis al la Esperantistaro milionulon kun malfermita monaĵo je la dispono de niaj propagandistoj, tamen, rezultate de tiu ĉi terura mondmito la specialaj cirkonstancoj jam venis (estas malbonega vento kiu neniam venigas bonaĵon), kaj nun ni nepre devas memori la vortojn pri la plentajdo kaj profiti la okazon per tuja kaj forta agado.

Nehavante kapitalon, ni devas trovi alian rimedon, kaj pro tio la INTERNACIA ESPERANTO EKSPERIMENTO estas organizita «por pruvi en kiel eble plej multe da landoj, ke post nur trimonata lernado de Esperanto oni povas facile entrepreni internaciajn komercajn rilatojn, dum nacia lingvo postulus almenaŭ 3 jarojn.»

Por sukcesigi la Eksperimenton oni starigis jam trimonatajn kursojn en diversaj urboj : Odessa, Astrahan, Tiflis (Rusujo), Beauvais, Angers, Nice, Bordeaux (Francujo), Madrid (Hispanujo), Kristiania (Norvegujo), Birmingham, Burnley, Belfast, Cork, Dublin, Edinburgo, Glasgovo, Huddersfield, Londono, Sheffield (Britujo).

Tiujn kursojn partoprenis en granda nombro kaj ekskluzive komizoj el diversaj komercaj firmoj, kiuj tre rapide eklernis Esperanton kaj uzis ĝin jam sukcese korespondante pri siaj profesiaj aferoj kun la instruatoj en la diversaj landoj. Tiel kontentiga estis la rezultato de la kurso kiun en Londono gvidis la iniciatinto de la Eksperimento ke la lernantoj donacis al S-ro Marshall artepresitan

dokumenton kun subskriboj kaj sigeloj, atestantan la bonan rezultaton de la kurso kaj la facilecon kaj utilon de Esperanto.

Jen estas unu el la efikaj rimedoj antaŭenirigi nian lingvon en la komercistaj rondoj kaj vidigi al ĉiuj industriistoj kaj negocistoj la praktikan utilon kaj la nedubeblan taŭgecon de tia valora interkomunikilo kia estas Esperanto. Efektive, ĉu povas ekzisti pli unuavida kaj konvinkanta elmonro de la praveco de nia propagando ol la fakto ke nur per tri monatoj de laborado tiuj komizoj lernintaj Esperanton sukcesis interkomunikiĝi kun alilandaj personoj, dum en ĉiu alia okazo ili bezonus ne malpli ol tri jarojn por iom korekte kaj ĝuste uzi la lingvon de tiuj-ĉi?

Unu el tiuj pruvoj, unu el tiuj praktikaj aplikadoj valoras kaj efikas pli multe ol deko da perfektaj paroladoj kaj plej konvinkigaj gazetaj artikoloj; kiam oni laŭdas kaj prikantus la facilecon de nia lingvo, oni povas dubi pri la sincereco de la parolanto, oni povas allasi ne malgrandan spacon al liaj lirikaĵoj trograndigoj, sed kiam oni per propraj okuloj konstatas la fakton, kiam oni vidas ke mallonga lernado kaj malgranda kvanto da tempo ebligas korespondadon kun eksterlandaj firmoj, ke per tiu malgranda sumo de klopodoj oni atingas la samajn rezultatojn kies elposedo bezonas longajn jarojn de laborado kaj studado, tiam neeble estas dubi kaj niaj propagandaj argumentoj aperas en tutaj siaj brilo kaj forto.

Ni devas esti dankaj al S-ro Marshall, kiu malgraŭ la milita krizo en Eŭropo, ne senkuragiĝis, sed elpensis kaj portis al sukcesa fino kun mirinda entuziasmo kaj imitema fido la de li iniciatitan Internacian Eksperimenton; ni povas nur bedaŭri ke la milito malebligas ke en ĉiuj landoj estu organizataj similaj kursoj kaj ke multaj Komercaĵoj, Ekspartaĵoj, Asocioj kaj privataj agentoj kaj komercistoj estu atentigitaj, per tiu-ĉi vojo pri la taŭgeco de nia lingvo por iliaj eksterlandaj rilatoj.

Tiu ĉi provo kiu malgraŭ la malfavora epoko, malgraŭ la malhelpoj kaj baroj aperantaj antaŭ ĉia internaciema laborado, havis tiel grandan sukceson, montras al ni kion ni povas esperi de bone kaj sisteme organizita propagando en la komerca kampo; kiom multe ni povos ĝin fruktigi se en la estonta tempo, kiam la paco denove fekundigos la teron, ni kuniĝos ĉiuj por laŭ harmonia kaj unueca maniero labori en la praktika aplikado kaj uzo de Esperanto.

Multe ni agis kaj multe ni propagandis en aliaj diversaj direktoj, kaj tre kontentigaj estas certe la rezultatoj atingitaj; sed en tiu-ĉi fako oni devas konfesi ke ni, la katalunaj esperantistoj, tre malmulton faris ankoraŭ, kaj se ni deziras kaj celas ke nia movado enlanda

fariĝu tiel vigla kaj forta kiel en la ceteraj landoj ni devas doni al tiu-ĉi flanko de la poresperanta propagando pli multe da klopodoj ol ni faris ĝis nun, kaj tio estos pli ol iam necesa kiam ĉesinte jam la bruo de la armiloj en la nunaj militantaj landoj, haltigite la produktado de eksplodiloj kaj mortigiloj en la grandegaj uzinoj, reatinginte ĉiu homo sian propran hejmon, ĉiuj nacioj ardos en la febro rekonstrui sian ruinigitan industrion, sian nuligitan komercon; rekomenciĝos tiam kun la potencaj kaj pacaj luktoj de l' produktado pli intense ol iam ajn la internaciaj rilatoj kaj kun tio la malhelpoj de la interkompreniĝo; en tiu momento necese estos ke ni vidigu al tiuj, kiuj bezonas internacie komunikiĝi, per maniero klara kaj nedubebla, ke ili malsaĝe elspezas sian tempon kaj monon en la lernado de fremdaj lingvoj, ni devos kompreni al ili ke nur per malmulta laborado ili povas atingi la saman aŭ eĉ pli bonan rezulton ol ili atingas per la laciga penado kaj ekzercado kiun postulas la uzo de nepropa idiomo, kaj por tio sendube taŭgos admirinde ĉiu pruvo kiu estos tiel klarvidiga kaj fekunda kiel la Eksperimento iniciatita de S-ro Marshall.

MARIAN SOLÁ



Dubo¹

DEVIZO : *Mar' brava, mar' verda,
maro lasimodania*

Fraŭlino rava kaj bela,
kiel lilio gracia :
la ĉarma rideto via
kaj via rigardo hela,
via harar' bonodora
kiun mi ŝatas karesi
dum mi vin aŭdas promesi
pri amo vera, fervora,
tiel forte min impresas,
ke mi ja neniam scias,
kio pli aminda estas:
haroj, kiujn mi karesas,
lipoj, kiujn mi envias,
okuloj, kiujn mi festas...

JAUME GRAU

1. Subpremio al la 1.^a Ordinara Temo en la VI^a Internaciaj Floraj Ludoj.

Joan Rosals

En la tago mem, kiam en Barcelono oni sciis per radiogramoj de la ĵurnaloj la morton de nia kara Majstro, mortis ankaŭ en nia urbo nia amiko Rosals, post tre nedaŭra malsano de tri aŭ kvar tagoj.

La nomo de nia samideano Rosals estos por ĉiam alligita al la esperantista movado kataluna : tre malnova esperantisto, li ĉiam konservis la entuziasmon de la unuaj tagoj, kaj estis bele aŭdi ĉiun momente de lia buŝo vortojn de antaŭeniĝo kaj kuraĝo : dum kelke da jaroj li estis la ĉiama profesoro de «Espero Kataluna», kies unua kaj honora prezidanto ankaŭ li estis; fervora membro de la K. E. F. li ĉestis en preskaŭ ĉiu kongreso, prezidante la Katalunan Ligon de Katolikoj, asocio kiu ankaŭ nomis lin sia unua prezidanto. Lia vendejo de la strato Portaferriŝa, estis tradicia rendevuejo de ĉiu samideano barcelona aŭ fremda. Afabla, simpatia, bona per sia karaktero kaj faroj li estis amiko de ĉiu esperantisto kataluna, kaj ĉiu esperantisto kataluna estis amiko de li : ankaŭ en eksterlando li kalkulis sennombrajn amikojn, konintaj lin de l' Kongresoj.

En la ceremonio de la enterigo estis multaj samideanoj dezirintaj doni al li la lastan adiaŭon : la morto rabis lin al ni kiam plej bezonate estis lia apogo kaj kuraĝo. Ripozu pace nia estimata kunbatalinto.



GRAVA AFERO

Bona sciigo por la esperantistoj de nia lando! «Quaderns d'Estudis» estas kataluna monata gazeto aperanta en Barcelono kaj eldonita sub la patronado kaj monhelpado de la «Mancomunitat de Catalunya». La proksima numero de Junio — 120 paĝoj — estos entute dediĉata al Esperanto, 40 paĝoj por propagando kaj 80 por la **Kataluna Antologio** kies originalo estas jam antaŭtempe preta, kaj atendanta nur bonan okazon por publikigi.

La okazo alvenis; post nelonge ni povos vidi dank' al malavareco de la «Mancomunitat de Catalunya», nian deziron realigita kaj **Kataluna Antologio** montriĝos kiel nova juvelo en la esperanta literaturo.

La koncerto de la sonoriloj

(el R. DE CAMPOAMOR)

(1817 - 1901)

(POR MUZIKO)

Tie pro *nask'* ili gloras
 Kaj ĉi tie pro *mort'* ploras:
 Dum tie sonigas man'
Din don, din dan!
 Tie ĉi la raŭka son':
Din dan, din don!

Tie *nask'*, ĉi tie *morto*.
 Ho monstra koncert' pri sorto!
 Ĝojigas min pri infan':
Din don, din dan!
 Kiel frap' de tomba ŝton':
Din dan, din don!

Ho kia granda fiktivo
 La kunec' de mort' kun vivo!
 Niaj penoj estas van'!
Din don, din dan!
 Ĝu' ne daŭras en person'!
Din dan, din don!

El hispana lingvo samrime tradukis

VICENTE INGLADA



EL NIA VII^a KONGRESO

— En unu el la ĉambroj de la «Centre de Lecturas» en Reus okazis la kunsido de la Konservantaro de la Floraj Ludoj; en ĝi oni elektis la membrojn de la Juĝantaro por nia VII^a Literatura Konkurso, kiuj estas : S-roj Josep Grau, Antoni Codorniu, Andrés Piñó, Marián Solá, Victor O. Allende, kaj Artur Domènech.

— La grupo «Nova Semo» organizinto de la brilaj festoj de nia VII^a Kataluna Kongreso volis delikate esprimi sian dankon al la ceteraj grupoj kiuj partoprenis en ĝi kaj tion ĝi faris per donaco de belegaj silkaj rubandoj kun adekvata surskribo al la grupaj standardoj kiuj estis senditaj al Reus kaj dum tiuj tagoj elmetitaj en la balkono de ĝia Urbodomo.

Mallongaj dialogoj por du personoj¹

1. POR DU FRAŬINOJ

DEVIZO : *Triopa Kordo*

*(Mario sidas apud tablo sub kiu estas granda korbo kun kovrilo.
Eniras ŝia amikino Luĉio.)*

L. — Bonan tagon, karulino. Ĉu vi fartas bone?

M. — Jes, dankon. Ĉu vi?

L. — Bonege, dankon, sed ŝajnas al mi ke vi estas iom malgaja.
Ĉu io malagrabra okazis?

M. — Ho, estas nenio.

L. — Jes, io, ĉar mi ekvidas ke vi estas meditema.

M. — Nur bagatelo. Mi devas ion rakonti al mia patrino kio eble
ne plaĉos al ŝi, kaj baldaŭ ŝi revenos. Mi pripensas la aferon.

L. — Kio estas? Rakontu ĝin al mi. Eble mi povos vin konsili.

M. — Volonte, sed vi nur ridos.

L. — Ne, ne, rakontu, se ĝi ne estas sekreto.

M. — Bone. Hieraŭ vespere mi revenis malfrue hejmen, kaj la ĉielo
estis tiel klara kaj la trankvila maro tiel bela sub la lunradioj,
ke mi haltis por admiri la vidaĵon kaj la brilantajn stelojn,
kaj sidiĝis sur unu el la benkoj de la promenejo. Estis nenio.
Mi nur aŭdis la voĉojn de kelkaj personoj malproksime kaj
la murmuron de la ondetoj sur la marbordo. Mi sidis
mediteme, revante pri ... eble pri mia amanto... kiam mi
subite ekvidis ke mi ne estas sola...

L. — Ha! mi komprenas. Komenciĝas aventuro! Eble bela junulo
aperis kaj sidiĝis apud vi. Sed daŭrigu.

M. — Jes, iu estis tie, kaj li...

L. — Kaj li ekparolis kun vi.

M. — Ne, li silentis, sed mi ekparolis kun li.

L. — Ho, Mario! vi ne estis tre saĝa aŭ modesta, kara mia, sed mi
esperas ke vi tuj foriris.

M. — Ne, mi restis, kaj li pli alproksimiĝis.

1. Premiita en la VI^a Internaciaj Floraj Ludoj.

L. — Ho, Mario!

M. — Li estis tiel bela kaj ĉarma. Kiaj belaj okuloj! Kiel longaj lipharoj!

L. — Ĉu li nenion diris?

M. — Nenion, sed subite li saltis sur miajn genuojn kaj... kaj karesis min.

L. — Ho! kial vi ne ekkriis?

M. — Sed tiam mi forlasis lin, kaj rapidis hejmen, sed...

L. — Sed kio?

M. — Li sekvis min, kvankam mi diris «ne sekvu min, mi petas ke vi ne sekvu min».

L. — Kaj tiam?

M. — Post iom da tempo li lasis min, kaj mi revenis domon, sed panjo mallaŭdis min pro mia malfrua reveno.

L. — Kaj vi nenion diris al ŝi?

M. — Ne, ĉar ŝi ekkoleris, kaj mi ne kuraĝis, klarigi la veran kialon pri mia forestado, kaj hodiaŭ matene...

L. — Vi ĉion rakontis.

M. — Ne, ĉar ŝi iris al la urbo kaj ne estas ankoraŭ reveninta.

L. — Abmenaŭ la afero estas finita, kaj vi ne plu renkontos lin.

M. — Sed, Luĉio, iom post ŝia foriro, li alvenis tien ĉi.

L. — Ho! vi permesis al li eniri? Kial vi ne rifuzis akcepti lin?

M. — Li eniris sen permeso, kaj ne volis forlasi min, kaj nun ĉiumomente mi atendas patrinojn, kaj...

L. — Sed kompreneble li ne estas ankoraŭ en la domo.

M. — Jes, certe, tie ĉi.

L. — Tie ĉi! Kie?

M. — Sub la tablo. Ho! Mario, vi ne komprenis. Li estas nur virkato. Li kuŝas en la korbo.

POR DU SINJOROJ. (*Sinjoro A. renkontas Sinjoron B.*)

A. — Bonan vesperon, Sinjoro.

B. — Bonan vesperon. Kion vi faris hodiaŭ?

A. — Mi iris al Monte Karlo.

B. — Ĉu vi amuziĝis?

A. — Ne multe.

B. — Mi ankaŭ estie tie.

A. — Ĉu vi ludis?

B. — Jes, iomete.

A. — Sed ne perdis, mi esperas.

B. — Mi perdis mil frankojn.

- A. — Mi kondolencas.
 B. — Kaj vi?
 A. — Mi konatiĝis kun bela fraŭlino.
 B. — Mi gratulas.
 A. — Sed mi perdis.
 B. — Eble vian koron.
 A. — Ne, mian simpation al ŝi.
 B. — Mi kondolencas.
 A. — Do vi perdis pli ol mi.
 B. — Sed poste mi gajnis naŭcent naŭdek frankojn.
 A. — Mi gratulas. Do vi perdis nur dek frankojn.
 B. — Jes.
 A. — Kiel mi.
 A. — Vi nur perdis la fraŭlinon.
 A. — Ne, mi perdis dek frankojn.
 B. — Sed kial?
 A. — Ŝi ŝtelis mian dekfrankan naztukon.
 B. — Mi kondolencas.
 A. — Do, ni ambaŭ perdis same.
 B. — Ne, ĉar poste mi regajnis dek frankojn.
 A. — Mi gratulas.
 B. — Do, vi perdis pli ol mi. Mi kondolencas.
 A. — Sed poste mi eltrovis mian naztukon sur la pavimo.
 B. — Mi gratulas.
 A. — Do neniu ion perdis.
 B. — Jes, mi perdis ion.
 A. — Kion?
 B. — Mi perdis mian tempon.
 A. — Vi estas prava. Ankaŭ mi.

POR SINJORO KAJ SINJORINO

(Ili estas fremduloj kiuj pasigas la vintron en Villanueva y Geltrú)

Sinjoro A. — Ĉu plaĉas al vi Villanueva?

Sinjorino B. — Ne multe, ĝi ne estas sufiĉe granda urbo.

A. — Nek trankvila kampara vilaĝo.

B. — Oni ne povas promeni suden pro la maro.

A. — Nek norden, ĉar tie oni trovas la muron de la montaro.

B. — Mi ne ŝatas la urbstratojn kun tiom da polvo, da ŝtonoj, da aŭtomobiloj.

A. — Kaj sur la montetoj estas nur vojetoj por muloj aŭ azenoj.

- B. — Jes, se la urbo kuŝus sur la pinto de alta monto, ĝi estus pli agrabla.
- A. — Aŭ kaŝita en profunda valo.
- B. — Ŝajnas al mi ke la azenoj devus kuri sur la apudmara vojo kaj la aŭtomobiloj sur la montetoj.
- A. — Ni bezonas aeroplanojn.
- B. — Ili estas danĝeraj.
- A. — Ho, la aeroplanoj devus vojaĝi sur la strato kaj la aŭtomobiloj en la aero, ĉar tiamaniere la unuaj neniam falus, kaj la duaj ne rompiĝus kontraŭ muroj aŭ rokoj.
- B. — Estas necble forvojaĝi, ni havas malmulte da vagonaroj.
- A. — Kaj ili ĉiam malfruas.
- B. — Same la tramoj. Tramo neniam ekforiras ĝustatempe.
- A. — Mankas bonaj vaporŝipoj.
- B. — Kaj por ĉevalveturilo oni pagas tro kare.
- A. — Ho, ĉio estas kara, ekzemple, la hoteloj.
- B. — Kaj la pensionoj.
- A. — La loĝejoj, la butikoj, la manĝaĵoj.
- B. — Oni povas apenaŭ aĉeti florbrasikon.
- A. — Jes, nur florojn sen brasiko. Kiu deziras vidi rozojn ĉiutage?
- B. — Kompreneble, unu aŭ du, sed ili estas tro vulgaraj.
- A. — Kaj la palmarboj, ĉiuj verdaj kaj similaj.
- B. — Aŭ la olivujoj, tiel grizkoloraj kaj diversformaj.
- A. — Ni estas samopiniuloj. Villanueva estus pli bona sen maro, sen montoj, sen arboj, sen stratoj, sen...
- B. — Jes, sed kun operdomo en kiu Karuzo kantus ĉiuvespere.
- A. — Kaj kie Sara Bernhard ludus dramojn la tutan vintron.
- B. — Aŭ almenaŭ kun lokoj kie seriozaj personoj povus studi.
- A. — Jes, la biblioteko havas nur librojn.
- B. — Kaj la muzeo nur antikvaĵojn k. t. p.
- A. — Sed oni neniam estus kontenta tie ĉi. La vetero estas tiel malbona. Kelkafoje pluvas.
- B. — Aŭ blovas malvarma vento; ĝi frostigas min.
- A. — Se ne, la suno estas tro varma; ĝi bruligas min.
- B. — Sed pli ol io mi abomenas la anojn.
- A. — Mi ankaŭ. Estas tro da Angloj kaj Amerikanoj.
- B. — Ankaŭ da Francoj, da Germanoj, da Rusoj, da...
- A. — Kaj da Hispanoj. Tamen, eble, Hispanoj devus loĝi en sia propra lando.
- B. — Eble, sed estas domaĝe. Se ĉiuj estus Japanoj, aŭ Ĥinoj, aŭ Turkoj, ili estus pli simpatiaj.

- A. — Jes, mi ofte demandas min mem, kial mi restas tie ĉi. Mi scias, sed vi, kial?
- B. — Kial? Ho, mi restas ĉar ĝi posedas unu allogaĵon kiun mi ne povas forlasi.
- A. — Mi ankaŭ. Mi konas kelkajn personojn kiuj estas tiel bonaj, tiel ĉarmaj.
- B. — Tiel lertaj, tiel spritaj.
- A. — Fraŭlinoj tiel belaj.
- A. — Junuloj tiel studemaj.
- A. — Sinjorinoj tiel sindonemaj.
- B. — Maljunuloj tiel bonkoraj.
- A. — Sed kie vi trovis viajn bonajn amikojn?
- B. — Kaj kie vi konatiĝis kun tiom da ĉarmulinoj?
- A. — Diru al mi.
- B. — Ne, diru al mi.
- A. — Nu, antaŭhierau mi aliĝis al la Esperanto-grupo.
- B. — Kaj hieraŭ mi ĉeestis la kunvenon de la Esperantistoj.
- A. — Ho jes! ili estas la Lumo...
- B. — La Ĝojo...
- A. — La Gloro...
- A. kaj B. — (*kane*) De Villanueva y Geltru. Vivu la Esperantistoj tie ĉi!

CLARENCE BICKNELL



ENLANDA MOVADO

Ni petas tre insiste al ĉiuj korespondantoj de nia gazeto ke ili ne forgesu ĉiunmonate raporti kvankam koncize pri la stato de la movado esperantista en siaj respektivaj verboj; tiu ĉi jako hiu estas ĉiam la plej grava deono plene elmontri la fervoran tashon de niaj enlandaj grupoj; ĉiu memoru ke la raporto pri siaj propraj festoj kaj sukcesoj stimulas kaj vigligas la dormantajn sameanojn!

BARCELONA : **KURSO DE ESPERANTO EN LA BARCELONA UNIVERSITATO.** — La kurso kiun gvidis tiel lerte en tiu alta lernejo dum la pasinta jaro 1916^a D-ro Joaquim Coll, Ptro. havis rimarkindan sukceson kiel oni povas vidi kaj konstati per la rezultatoj atingitaj en la ekzamenoj kiuj finis la kurson 1915-1916 : Diplomono de Kapableco kaj Profesoreco de la K. E. F. ricevis S-ro Eric Alba Alorda; en la Duagrada kurso estis premiitaj S-roj Jaume Guixà, Jaume Grau, Eric Alba (Supera Merito) kaj S-roj Ramón Ribas, Joan Coca (Alta Merito); en la Unuagrada kurso : S-ro Richard Marx (Supera Merito), S-ro Josep Torné (Alta Merito) kaj S-roj Eric Vagués, Eric Santamaría, Rosendo Berga, Manuel Sorolla (Merito).

Al ĉiuj premiitoj kaj al ilia klera profesoro niajn plej korajn gratulojn.

— La grupo esperantista *Paco kaj Aŭso* suferis gravan perdon en la persono de sia prezidanto S-ro Paulo Pérez kiu mortis la 13^{ma} de la pasinta Marto, P. L. R.

Por rememorigi la altvalorajn servojn de la sindonema samideano, *Paco kaj Aŭso* dediĉis al li marmoran tabulon kiun oni malkovris ĉe lia tombo antaŭ multnombraj samideanoj kaj amikoj de la mortinto.

Al lia senkonsola familio kaj al la esperanta societo ni sendas la esprimon de niaj plej sinceraj kondolencoj.

— La grupo *Barcelona Stelo* organizis la 16^{ma} de Decembro teatran vesperfeston dum kiu oni ludis la katalun-esperantan duaktan komedion «Dank» al Esperanto originale verkitan de la grupano S-ro Joan Gironés, verko kiu enhavas grandan propagandan intereson, kaj la katalunan komedieton «La Sala de rebres» (La akcepta ĉambro); la ludon partoprenis F-inoj M. Grau kaj C. Navas, keĉkaj B. S.-anoj kaj S-ro Canales el *Nova Sento*.

— La esperantista grupo *Espero Kataluna*, la plej malnova el nia lando aliĝis al la K. E. F., al ĝiaj fervoraj kaj entuziasmaj anoj ni deziras koran bonvenon en niajn vicojn.

— La *Barcelona Hejmo de la K. E. F.* ŝanĝis sian sidejon kiu estas nun en la strato Diputació, 280.

— La esperantistoj estis reprezentataj en la manifestacio organizita por honori la memoron de la glora poeto kaj muzikverkisto kataluna Josep A. Clavé, kaj doni lian nomon al unu barcelonà strato. La esperanta standardo altiris la atenton de la publiko kiu laŭde parolis pri la partopreno de la esperantistoj en tiu festo.

La organiza komitato de la homaĝia festo dankis per bela diplomo la grupon *Barcelona Stelo*-n sub kies standardo la esperantistoj kuniĝis.

— La grupo «Nova Sento» aranĝis la 10^{ma} de Septembro okaze de la popola festo en la kvartalo «Poble Nou» tre sukcesan esperantan ekspozicion. Por solenigi ĝian malfermon la organizinta societo pretigis feston kiu konsistis el parolado, donaco al la grupo de la esperantista standardo kaj balo.

La paroladon diris kun elokventeco S-ro Josep Grau, kiu longe kaj kvinke parolis pri la «Utileco de Esperanto». Tuj poste S-ro Canales, prezidanto, parolis pri la malsameco inter nia pacema standardo kaj la ceteraj.

La ekspozicio, arte instalita en la ĉambroj de la grupo estis multe vizitata en tiuj tagoj; por festi ĝian sukceson ludo estis organizita la 17^{ma} de la sama monato; ĝin honoris per sia ĉeesto Lia Muŝto S-ro Marti Ventosa, suburbestro de la 1^a Distrikto, S-ro Prezidanto de la «Cooperativa Independientes», S-ro J. Grau, direktoro de K. E., S-ro Balcells, S-ro D-ro Torelló kaj la tuta anaro de la grupo; post la tustoj paroladis S-ro Marti Ventosa kiu gratulis la grupon por ĝia laboro kaj kuraĝigis al ĉiuj daŭrigi senhalte ilian laŭdindan taskon.

— En la kunveno okazinta la 23^{ma} de januaro, *Nova Sento* elektis la jenan komitaton: prezidanto, S-ro Jozefo Canales, vicprezidanto, S-ro Johano Compte, sekretario, S-ro J. Pujol, vicsekretario, S-ro M. Gil, kasisto, S-ro S. Vives, kalkulisto, S-ro J. Viñas, monkollektanto, S-ro P. Benitez.

TERRASSA.—La grupo *Lismon* elektivigis la 9^{ma} de Aprilo interesan ekskurson al Martorell kaj Gelida; ni veturis je la 6^a matene al Martorell, tagmanĝis en Gelida, vizitis la vidindaĵojn de ambaŭ urboj kaj revenis, tra Barcelona, al nia urbo; la ekskurson partoprenis grandanombre niaj gesamideanoj. — *La Korespondanto*.

Ĉiu membro de la *Kataluna Esperantista Federacio*, aŭ aboninto al *KATALUNA ESPERANTISTO* rajtos unufoje dum la jaro publikigi malgrandan anoncon, kiu senpage aperos ankaŭ sur *Amerika Esperantisto*.

Deziras korespondadon:

S-ro Juli Llavià, Plaça de la Creu, 3, Palafrugell,

La membroj de **Esperantista Klubo Palma**, str. Misión, 5, 1.^{er}, deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj, precipe pri ĥernio.

S-ro Lluís Santacana, Carretera, 71, Molins de Rey, Barcelona.

S-ro Miquel Perich, P. Meridiana, 115, Barcelona.

Novaj adresoj:

S-ro Pere Navas, str. Cano, 58, ent.^o, Barcelona.

S-ro Josep Guixà, str. Santa Catarina, 50, 3.^{er}, Barcelona.

QVADERNS D'ESTVDI

Revista dedicada especialment a Mestres i Professors

Publicació mensual del Consell d'Investigació Pedagògica de la Diputació de Barcelona sota els auspicis de la MANCOMUNITAT DE CATALUNYA

Preus de suscripció anyal

Catalunya, València i Mallorca	4 pessetes
Reste d'Espanya	5 " "
Estranger	5 francs

Número solt : 50 cèntims

Se distribuiràn gratuïtament a tots els mestres oficials de Catalunya i a tots els professors de Centres d'Ensenyança sostinguts per la Diputació

ESPERANTISTOJ

Uzu en via propagando markojn Amades. Ili enhavas la propagandan frazon "Lernu la lingvon internacian Esperanto". Da ili ekzistas en ĉiuj lingvoj el Eŭropo kaj en tiuj plej gravaj el Azio kaj Afriko. Serion de 50 malsamaj lingvoj kontraŭ 0'50 pesetoj (du respondkuponoj).

S-ro JOAN AMADES : Peu de la Creu, 10, tda.

BARCELONA : HISPANUJO

PRESKAŬ DONACE

PROFITINDA OKAZO por grupoj, societoj, instruistoj de Esperanto, ktp. Kolektojn de 50 diversaj esperantaj gazetoj mi verdas por la tre malkara prezo de 5 pesetoj (da Sm.) plus la sendelspezoj, unu peseto (40 Sd.) por Hispanujo, kaj 1'50 pesetoj (60 Sd.) por fremdlando. Mi akceptas la pagojn preferinde en hispana mono, aŭ en ĝia ekvivalento en ia fremda mono, per transpagiloj de l'Ĉekbanko esperantista, respondkuponoj, poŝta ĝiro, bankbiletoj, aŭ banknotoj.

S-ro JOAN AMADES : Peu de la Creu, 10, tda.

BARCELONA : HISPANUJO